

al rabobesto la vivo en boncela kaptiteco. La manko de taŭga manĝaĵo: la digestosistemo de sovaĝa leopardo evoluis, spertante iom putrajn bestokadavrojn, kaj ne ĉiu parto de morta besto estas egale nutra por sovaĝa leopardo. La provizado de nur freŝa viando efektive malsanigas Ĵimon, kiu resaniĝas nur post eskapo el la “protektita regiono”, kiun prizorgas boncelaj homoj. Ankaŭ la manko de senlima libero vagadi kaj trovi naturajn kaŝlokojn por tranoktado aŭ por naski kaj varti idojn povas endanĝerigi kaj la korpan kaj la psikologian sanon de la rabobesto.

Aliflanke, la bezonoj de la homoj, klopodantaj vivteni sin, bredanta bestojn kaj kreskigante necesajn vegetaĵojn por la homa nutrado, konflikta kun la vivbezonoj de la sovaĝaj bestoj. Ĉu ekzistas eblo solvi tiun dilemon? La aŭtoro, per sia tre hom- kaj bestama

detaligo de la ivo en tiaj regionoj, tre klare montras al ni la naturon de tiu dilemo. Ĉu vivanto renkontas gravajn, kaj ne ĉiam supereblajn, problemojn. Ni ne tro idealisme imagu, ke la paca kunekzisto estas fundamenta parto de la naturo. La naturo estas tiom pereiga, kiom vivefika.

Kvankam valora kaj ĝudona romano por infanoj, ankaŭ por plenkreskaj homoj la verko taŭgas. Ne atendu kutiman avonturromanon, plenan de ekscitaj, sed malfacile kredeblaj eventoj. Sed ja atendu tre versimilan priskribon de la reala vivo, kiel



ĝin spertas realaj vivantoj. Kaj pretu etendi la varmon de via koro kaj alo sovaĝa besto, penanta vivteni sin en danĝeroplana medio, kaj al la homoj, kiuj simile penas vivteni sin en egale danĝeroplana medio:

Verko rekomendinda por serioza leganto, ĉu infana, ĉu aĝe post-infana.

Dr. Donald Broadribb  
59 B, Lukin St.

Beverley, WA 6304 / AŬSTRALIO

## Scienca eĥo

Fonto de la scienceĥaĵoj: la datoj (en krampoj) estas la cititaj ŝirfolioj de Brockhaus-kalendaro “Kion tiel ne diras la leksikono”

### Fiŝtranĉiloj

En antaŭaj tempoj la manĝotranĉiloj estis farataj el malaltkvalita ŝtal-aloyo, kiu alikoloriĝis post ekkontakto kun certaj nutraĵoj. Eĉ pli malbone: ankaŭ la gusto fariĝis tre malagraba. Reagis terpomoj, ovo, asparago kaj fiŝo. Tiuj surtablaĵoj ricevis “tranĉil-malpermeson” en la genealogia arbo resp. en la tiam oficialaj mastrumadkuirejaj libroj, kiu ankoraŭ hodiaŭ fantomadas tra la manĝokutimoj. Kvankam ĝi intertempe estas tute superflua pro la novaj manĝilar-metaloj.

Specialaj fiŝtranĉiloj ekaperis nur meze de la 19-a jarcento. Ili konsistis el altkvalita arĝento kaj ilia formo rezultis el tiu ĉi materialo, ĉar arĝenton oni ne povas akriĝi. Ke la fiŝtranĉiloj estas malakraj ja tute ne gravas dum la dispecetigo de mola fiŝo. Kaj kiel oni sin provizore helpis antaŭ la invento de fiŝtranĉiloj? Tiam la fiŝo estis disŝirita per du forkoj. Tio tre facile funkciis, ĉar tiam (kaj ankoraŭ hodiaŭ) la fiŝoj estis tiom longe kuiritaj, ke ili disfalis per si mem.

(2009-12-30)

### Alumetskatolaj aŭtomobiloj

Lesley Smith kaj Rodney Smith (ne fratoj, sed amikoj el la lerneja tempo) fondis en la jaro 1947 en Edmonton (proksime de Londono) la firmaon “Leslejaj Produktaĵoj” (“Lesley Products”). La entrepreno celis produkti gisaĵojn, sed ne faris bonajn negocojn. Pro tio oni produktis ekde 1948 zink-muldaĵajn (infanajn) ludilojn, en 1952 tre sukcesan modelon de la kronadceremonia kaleŝo de la reĝino Elizabeth la Dua.

Ekde tiam la Lesleja Produktofirmao prosperis – danke al brila ideo, kiu baziĝis sur la scio pri la britaj lernejo-reguloj: la infanoj ne rajtis kunporti en la lernejon iun ajn ludilon pli grandan ol alumetskatolo (angle “matchbox”). La unuaj modeloj estis vaporulilo, basen-baskulkamiono kaj cement-miksilo. Jam ekde 1956 oni eldonis serion de antikvaj aŭtomobilmarkoj (angle “Oldtimer”) por kolektantoj. En la 1970-aj jaroj, la Leslej-firmao ankoraŭfoje fanfaronis per “Superrapid-modeloj” kun senrajpe glataj aksoj.